

# ESPERANTO JUNULARO

## CIRKULERO DE SUDBOHEMIA ESPERANTISTA JUNULARO

Malnovtempa urbo Krumlov, iam glora sidejo de plej riĉaj sinjoroj de Rozo, situas sur ambaŭ bordoj de rivero Vltava, kiu kun granda arko fluas ĉirkaŭ potenca roko terlango. Sur ĝi leviĝas fiero, kun alta cilindra turoornamita kastelo, ĉirkaŭprenanta per freŝa verdaĵo de bela parko plena da sorĉoj kaj da romantikaj restaĵoj el mezepoko.



La urbo Krumlov estas krom tio super aliaj ĉeĥaj urboj interesa per tio, ke en urbo estas multe da malnovaj domoj de urbanoj kun ŝildoj, frontonoj kaj arkaĵoj, plejparte sur malgranda, sed historia urba placo. Apartaj memorindaĵoj estas preĝejo de skt. Vito, de princo Vilém el Rozenberg. Ĝin konstruis konstruisto el Krumlov Majstro Staněk. Preĝejo de skt. Spirito kun bela pentraĵo de ĉeĥa pentristo. La pentraĵo prezentas Madonon kun Jesueto, pentritajn

sur ora fundamento. Ankaŭ multe da aliaj memorindaĵoj estas en Ĉ. Krumlov. La urbo havas ĝis nun tipan mezĉeĥan solenecon.

### UPOZORNĚNÍ

Všem účastníkům krajského sjezdu esperantské mládeže v Českých Budějovicích ve dnech 17. května oznamuje junulara, že účastníci prý se . Výbor Junulara, kteří přijdou v sobotu 17. května dopoledne do 11 hod. mohou navštívit hrad Český Krumlov. Vlak do Českého Krumlova odjíždí před 12 hod. dopolední. Zájezd povede některý z českobudějovických samideanů. Návrat z Čes. Krumlova v 17 hodin.

### La unua de la majo en Bohema arbaro (Šumava)

La unua de la majo (ja gaja freŝeco sonas ĉie) altirante al ĉio, kio estas agrabla kaj bela en naturo, en sia dolĉa, raviga bildo, kie kantas birdoj tiel belsone, kiel ili neniam kantis. Kie flirtas la papilioj multe pli gaje ol iam; ĉiam ĉielo ŝajnas blua, kaj la suno pli radiobrilas, la aero pli freŝa super la verda herboj kaj bonodoraj floroj.

Tiaj estas profundaj sentoj kaj impresoj ekvidante ŝtonepokan kastelon Ĉ. Krumlov, sudbohemian Venecion.

Monto "Klet" kun observa turo, Zlatá Koruna (Ora Krono), memorfabelan monaĥejon fondita de reĝo Přemysl Otokar Ia, ruino "Dívčí Kámen", apud rivero Vltava, Trocnov, lokon de naskiĝo de bohema heroo Jan Žižka; kastelo Hluboká,

konstruita laŭ angla modelo "Windsor" ĉirkaŭita de belaj promenadoj, ĝardenoj; kie troviĝas Ĉase kastelo kaj granda arbarbestejo.

Tiuj ĉiuj belaj objektoj en la koron eniras kaj daŭre restos, kiuj montras al ni la malavara naturo por vekti niajn sentojn.

Do! Ne hezitu! Venu admiri kaj ĝoji en sudboheman metropolon Ĉ. Budějovice.

Ploss Josef

Komitato de Esperanto junularo xxx s-anoj F. Hochhanel, V. Novotný kaj F. Ernest por ilia kunlaboro al nia " Esperanta Junularo."

### Raporto de Junularo České Budějovice!

17. de april. finis kurso por komencantoj: Nia junulara proponis programon por maja junulara kunveno. Propono okazis jaŭde.

Post foriro de k-do Novotný estis balotita nova junulara komitato:

Gvidanto	s-ano	Miloslav	V l k
Delegatino	s-ino	Eva	L i p o r t o v á
Kulturreferantino	s-ino	Zdeňka	T e s a ř o v á
Kasisto	s-ano	Láďa	L i p o r t
Presreferenco	s-ano	František	N y m b u r s k ý

### Atentigo!!!

Nia junulargvidanto k-do N o v o t n ý Vladimír foriris militservi kaj venos denove post kvin monatoj; dum tiu tempo ni petas, sendu la tuta korespondaĵo, demandoj kaj monsubtenoj al nia adreso:

"Esperanto-Junularo, Šumavská 250, Ĉes. Budějovice."

Por ŝpari elspezojn, vi povas sendi monan subtenon rekte al konto de nia klubo per blanka poŝtpagilo: titolo: Pro ŭĉet ĉ: 92.904 Esperantista Klubo "La Progreso" en Ĉ. Budějovice.

Adiaŭ kaj ĝis revido!!!

En nia kunveno okazinta la 10a de Aprilo surprizigis nin nia junulargvidanto k-do N o v o t n ý Vladimír, informinte nin, ke li devas kvin monatojn militervi; li transdonis ĉio en majoj de junaj komitatanoj esperante ke li laboros tiel diligente kaj ofereme, kiel li mem; la tuta junularo promesis al forironta k-do labori senlace kaj forte, sub helpo de ĉiuj malnovaj kaj maljunaj klubanoj. La tuta junularo, sed ankaŭ klubo dankas k-don Novotný por lia ĝisnuna laboro kaj esperas saluti lin denove tre baldaŭ en niaj vicoj.

# Literatura anguleto:

J. BAGHY: LA VERDA KORO

(Daŭrigo kaj fino)

En la simpla lernoĉambro la lernantoj kaj lernantinoj komprenas, kio estas bona bela kulturo, sed.... sed en la Popola Domo estas nu nur lernoĉambro. En ĝi estas biblioteko kaj teatro kaj ... kaj en la biblioteka ĉambro ludas musoj kaj kato; en la teatro ludas rusoj kaj politiko. La kato manĝas la musojn, la politiko manĝas la rusojn kaj ... kaj en la griza, malpura lernoĉambro militkaptito instruas Esperanton.

- Sinjorinoj kaj sinjoroj, Esperanto estas homa kompreno. En la ĉambro sidas rusoj, ĉeĥo, polo, latvo, slovako, rumano, germano, ĉino kaj hungaro. Ili estas homoj. Kiaj homoj ili estas? Modernaj homoj. La modernaj homoj ŝatas la kulturon kaj ili lernas Esperanto, lernas "homan komprenon".

## La origino de l' malamo inter kato kaj hundo.

Foje la leono kunvokis la reprezentantojn de la tuta bestaro. Ĉiuj alvenis ĝustatempe nur la kamelo mankis. "Iru kaj alkonduku la kamenlon", ordonis la reĝo de la bestoj al la hundo.

"Sed mi ĝin ne konas laŭ la aspekto; Ĝi estas facile ekkonebla pro la granda ĝibo, kiu malornamas ĝian dorson."

Foririnte, la hundo dumvoje renkontis dorskurbiĝantan katon kaj opiniante, vidi la serĉatan Ĝibulon, ĝi demandis: "Ĉu ci estas la kamelo?" Pro tia demando la kato ofendiĝis tiom, ke ĝi furioze atakis kaj insultis la hundon.

De tiu tempo datas la tradicia malamo inter kato kaj hundo.

## SUBTENOJ AL NIA CIRKULERO:

ĝis fino de aprilo sendis al ni subtenojn jenaj esperantistoj:

Rudolf N ě m e c , Gottwaldov .....	Kĉs	30,-
Old. D r u n e c k ý, Ústí n/Lab. ....	Kĉs	30,-
Josef P l o s s, Č. Budějovice .....	Kĉs	20,-
O. Z v o r a l o v á, Most .....	Kĉs	100,-
Jan B í n a, Chlumeček u Kremže .....	Kĉs	20,-
Frant. S v a ĉ i n a, Lanžhot .....	Kĉs	50,-
Zájmový kroužek esperantistů R O H		
J e d n o t a – ústředí Písek .....	Kĉs	150,-

## ALVENINTA KORESPONDADO:

Karaj samideanoj,

mi dankas al vi por vian agrablecon, kun kiu vi sendis al mi vian cirkuleron "Esperanto Junularo", kiu montras ke Esp. vivas ankaŭ post ĉesigo de gazeto "Esperantista".

Kore salutas Th. R. Čejka  
ooo

Karaj samideanoj,

ankaŭ mi estas Sudbohemiano, ne unufoje mi staris kaj sidis sur monto Klet', kiun mi preferis nomi Schöninger aŭ Šeninger, tial mi estas ankoraŭ pli profunde kortuŝita pro via bulteno junulara. Mi ĝojas pri junulara aktiveco en via urbo kaj gratulas al redaktantoj de la bulteno.

Mi salutas vin amike kaj deziras al via laborado sukceson kaj persistemon,

Kamarýt

ooo

Mi legis vian gazeton "Esperanto-Junularo" kaj plaĉis al mi. Mi deziras multajn sukcesojn al la gazeto kaj salutas vin.

S-ino Heleno Juhacz  
Hungario

## **Bonhumoroj**

"Kial vi diris falsan nomon okaze de elaŭskulto?" demandis juĝisto.

La kulpanto respondis: "Mia patrino ĉiam diris al mi: Faru, kion vi volas, sed tenu vian familian nomon eterne pura."

xxxxxx

Geonkloj vizitis parencojn kaj diris pri malgranda Peĉjo:

"Ĉarma, dolĉa knabeto, via Peĉjo; li havas okulojn de la patro kaj nazon de la patrino."

Peĉjo tuj aldonis: "Kaj vestaĵojn de mia pli maljuna frato."

"Kiel kreskas via abelbredado?" demandis s-ron Kant lia amiko.

"Mi dankas, kamarado; mielon mi ĝis nun ne ricevis, sed abeloj jam trifoje pikis mian bopatrinojn kaj ŝi nun ne vizitas nin."

Iu muzea vizitanto staras antaŭ statuo de gladiatoro; al ĝi mankas unu mano kaj duono de piedo, la nazo estis tute disrompita; sub la statuo staras: "La venkinto". Ho ve, diris la rigardanto; se tio estas la venkinto, kiel poste aspektas la malvenkinto?"

Pastoro parolas al siaj lernantoj: "Tri aĵojn vi devas eviti: Alkoholon, virinojn kaj ludkartojn; sed se vi iufoje tamen devas elekti el tiuj tri, poste elektu ludkartojn."

---

Eldonas senpage, laŭbezone ZK ROH poŝtovních zaměstnanců, Č. Budějovice, Esperanto-sekcio. Redaktas komitato de ESPERANTO-JUNULARO, Č. Budějovice. Korespondadreso: ESPERANTO-JUNULARO, Šumavská 250, České Budějovice.